

Francjozefaj Insuloj kaj Julius Payer

Oldřich Arnošt Fischer

Kluba prelego por Esperantista Klubo Brno, filia societo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, la 16-an de novembro 2021

Mi kolektas bildkartojn. Okaze de ekspozicio SUB IMPERIESTRĀ AGLO (1991 – 1992) en Moravia Landa Muzeo en Brno mi hazarde aĉetis la bildkarton, kiun oni eldonis en Brno en la jaro 1991: **Malkovro de Francjozefaj Insuloj en la jaro 1873 / Pafcelo el jaro 1875 el kolekto de Patrujsciencia Muzeo en Olomouc.** La pafceloj servis por trejnado de precizaj pafistoj, la samaj precizaj pafistoj, kiujn vi scias el fama filma komedio „Antonio Ŝpelec, la preciza pafisto“ („Anton Ŝpelec, ostroŝrelec“) kun bonega ĉeĥa komiko Vlasta Burian. Precizaj pafistoj estis volontuloj, urbanoj, kiuj trejnis pafadon. Por tio ili uzadis lignajn pafcelojn. Rigardante la bildkarton mi en mia fantazio vidis marŝantajn pafistojn kaj aŭdis aŭstro-hungaran himnon:

*Gott erhalte, Gott beschütze
unsern Kaisern, unser Land!
Mächtig durch des Glaubens Stütze
Führ' er uns mit weiser Hand!
Laßt uns seiner Väter Krone
Schirmen wider jeden Feind:
Innig bleibt mit Habsburgs Throne
Österreichs Geschick vereint.*

*Zachovej nám, Hospodine,
císaře a naši zem!
Dej ať z viry moc mu plyne,
ať je moudrým vladařem!
Hajme vždy koruny jeho
proti nepřátelům všem.
Osud trůnu habsburského
Rakouska je osudem.*

Monarĥon kaj nian landon
savu al ni, Eternul',
por ke li super ni regu
kiel saĝa potencul'!
Malamikojn de lia krono
ni subpremu en konkord'.
Sorto de habsburga trono
tutaŭstria estas sort'.

Aŭstro-hungara himno, la 1-a strofo.



Inter polaraj vojaĝantoj sur la pafcelo mi vidas junan barbulon, kiu portas aŭstro-hungarian flagon. Verŝajne tio estas Julius Payer.

Kiu estis Julius Payer

Julius Payer naskiĝis **la 2-an de septembro 1841** en Šanov, kiu nun estas parto de la urbo Teplice (norda Bohemio). Lia patro estis emerita armea oficiro. Jam kiel knabo Julius ekŝatis montaron. Bedaŭrinde, familio de lia patro ne estis riĉa, tial gepatroj decidis, ke Julio fariĝos oficiro de aŭstria armeo. Li jam kiel 10-jara knabo devis ekstudi en kadeta lernejo en pola urbeto Łobzów proksime de Kraków. Kiam li estis 14-jara, lia patro mortis.

Post studado en pola kadeta lernejo Julius foriris en Vienon (Wiener-Neustadt), kie li studis en Tereziana Militakademio (1856 – 1859) kaj oficiriĝis. En la jaroj 1860 – 1862 li servis en italia urbo Verona. Li estis bona oficiro, sed pli multe ol pri sia oficira kariero li revis pri ekskursoj en Alpoj.

Aŭstria oficiro kaj sukcesa alpinisto

Nur en la jaro 1863 en aŭstria urbo Eisenstadt Julius Payer trovis laboron de kadeta instruisto. Tie li dum sia libera tempo povis pli multe okupiĝi pri alpinismo. Baldaŭ oni ĝin translokigis alien, en Venecion, ĉar li „tro sendepende pensis“. (Ekde tiu tempo armeoj ne tre ŝanĝiĝis, ĉar al soldatoj de ĉiuj armeoj en la mondo oni permesas fari preskaŭ ĉion, nur ne sendepende pensi.)

Ekde la jaro 1863 li trarigardis Alpojn, kie li kun primitivaj alpinismaj helpiloj konkeris la plej altajn montarojn Adamelojn (3 554 m) kaj Presanelojn (3 561 m). Rezulto estis preciza mapo (1:56 000). En la jaroj 1865 – 1868 li mapis Ortlesajn Alpojn. En Alpoj li konkeris pli ol centon da montaj pintoj. Sur 43 pintoj el ili li estis la unua alpinisto, kiu tien alvenis.

Prusia-Aŭstria milito

Vivon de Julius Payer influis prusia-aŭstria milito (1866). Pri kio temis?

Ekde la jaro 1815 (post Viena Kongreso, kies celo estis aranĝo de politikaj rilatoj en Eŭropo post militoj kontraŭ Napoleono) Aŭstrio kaj Prusio estis du la plej fortaj ŝtatoj de Germana Federacio (Aŭstrio, Prusio, Saksio, Bavario, Badeno kaj Virtenbergo). Prusio fariĝis industria lando kun forta armeo. Ĝia rivalo estis Aŭstrio, kiu estis pli granda, sed ne tiel evoluita, kaj havis bele vestitan, sed postiĝintan armeon. Al prusia reĝo **Wilhelm la 1-a** (1797 – 1888) el dinastio Hohenzollern plaĉis plano de prusia politikisto **Otto von Bismarck** (1815 – 1898) unuigi Germanion „pere de fajro kaj fero“. En januaro 1864 prusia kaj aŭstria armeoj kune atakis Danion. En aŭgusto 1864 ili konkeris daniajn princajn Ŝlesvigon kaj Holstinion, kies civitanoj parolis precipe germanan. Poste ili dividis sian predon. Prusio ricevis nordan parton, Ŝlesvigon, kaj Aŭstrio sudan parton, Holstinion. Se prusoj volis eniri sian Ŝlesvigon, ili devis transiri aŭstrian Holstinion. En tiu komplika situacio prusoj facile provokis militon kontraŭ Aŭstrio. Antaŭ la milito prusoj akiris subtenon de itala reĝo Viktor Emanuel la 2-a.

Pruslando estis por la milito pli bone preparita. Prusa politikisto Otto von Bismarck jam longtempe proklamis: „Ni estos amboso, se ni faros nenion, por esti martelo!“ En prusia armeo oficiroj aplikis drilon, sed ankaŭ enkondukis novajn tehnikojn.

Aŭstriaĵ soldatoj devis al batalkampo marŝi piede, sed prusoj transportis multe da provizoj kaj soldatoj per trajne. Aŭstriaĵ soldatoj uzadis pafilojn de la sistemo Lorenz, kiujn ili devis ŝarĝi el antaŭa parto de pafiltubo starante. Tial ili bezonis batali en formacioj, same kiel antaŭ 60 jaroj dum kontraŭnapoleonaj militoj. Unu vico pafis, poste retiris malantaŭ la dua linio, rapide ŝarĝis siajn pafilojn kaj denove iris pafi en la unuan linion.

Prusoj uzadis moderajn pafilojn de la sistemo Drayfus. La pafilojn ili povis ŝarĝi kuŝante de la malantaŭa parto de la pafiltubo. Ili kapablis pafi trifoje pli rapide ol aŭstriaĵ soldatoj. Prusa armeo ne batalis en grandaj formacioj, sed en malgrandaj taĉmentoj.

La 16-an de junio 1866 prusia armeo atakis Aŭstrion el nordo kaj italia armeo el sudo. Post fiasko en batalo apud Solferino (la 24-an de junio 1859) aŭstria imperiestro **Francisko Jozefo la 1-a** (1830 – 1916) jam ne volis persone gvidi sian armeon, tial la sudan aŭstrian armeon gvidis **ĉefprinco Albreĥt Aŭstria-Teŝena** (1817 – 1895) kaj nordan armeon generalo **Ludwig von Benedek** (1804 – 1881). Prusoj similis preparadon de atako en Silezio. Benedek logike atendis prusan atakon en Moravio, apud la urbo Olomouc, sed prusia militestro **Helmuth von Moltke** (1800 – 1891) atakis nordorientan Bohemion. Serio de aŭstriaĵ malvenkoj apud Trutnov, Jiĉín, Náchod, Turnov, Mnichovo Hradiště kaj Česká Skalice kulminis per masakro apud Sadová kaj Hradec Králové (la 3-an de julio 1866).

La 20-an de julio 1866 apud la insulo Vis aŭstria admiralo **Wilhelm von Tegetthoff** (1827 – 1871) venkis italan ŝiparon.

Spite de aŭstriaĵ sukcesoj apud Custozza kaj en la marbatalo apud Vis prusoj venkis Aŭstrion, kiu perdis kvinfoje pli multe da soldatoj ol Prusio, kaj eniris en Pragon. En moravia urbo Mikulov aŭstroj devis kapitulacii. Aŭstrio ne plu estis membro de Germana Federacio, kiu estis anstataŭita per Norda Federacio (sen Aŭstrio). En la jaro 1871, post venko de Francio, prusoj unuigis Germanion kaj Wilhelm la 1-a fariĝis imperiestro.

Julius Payer partoprenis en la batalo apud Custozza (la 24-an de junio 1866), kiun Aŭstrio venkis. Li estis ordenita.

Sukcesa kartografo

Danke al preciza kartografa laboro Julius Payer en la jaro 1868 estis okupita en Armea Geografia Instituto en Vieno. Fruktodona estis lia kunlaboro kun **August Heinrich Petermann** (1822 – 1878), en kies ĵurnalo *Petermanns Geographische Mitteilungen* li publikis raportojn pri siaj alpinistaj ekskursoj.

Petermann rekomendis lin al **Carl Christian Koldewey** (1837 – 1908), gvidanto de germana polara ekspedicio.

La unua polara ekspedicio (1869 – 1870)

Jam en mezepoko Eŭropanoj klopodis trovi Nordorientan Maran Vojon, kiu ebligus transporton de varo inter Eŭropo kaj Orienta Azio. (Sueza Kanalo estis konstruita nur la 17-an de novembro 1869.) La plej famaj estas gvidantoj de polaraj ekspedicioj **Willem Barents** (1550? – 1597), nederlandano, kiu en la jaro 1594 trovis Novteron kaj akiris la 78-an gradon de norda latitudo, kaj dano **Vitus Jonassen Bering** (1681 – 1741), kiu servante al rusoj trovis vojon el Siberio en Pacifikon. Ankaŭ fama rusa natrusciencisto **Mihail Vasiljeviĉ Lomonosov** (1711 – 1765) en sia verkaĵo temis pri ebla ĉeesto de iu norda mara vojo.

Ekspedicio de Carl Christian Koldewey, en kiu partoprenis Julius Payer kaj ĉeĥa geologo kaj paleontologo **Gustav Karel Laube** (1839 – 1923), havis vaporŝipon Germania kaj velŝipon Hansa. Oriente de Groenlando la ekspedicio perdis sian velŝipon Hansa, kiun glacio tute frakasis. Julius Payer mapis marbordon de nordokcidenta Groenlando inter la 74-a kaj la 77-a gradoj de norda larĝitudo. Li konkeris la monton Sattelberg (1 140 m) kaj tiel fondis novan sportan disciplinon, **polaran alpinismon**.

Post reveno Payer estis honorigita per aŭstria Ordeno de Fera Krono (1870).

La dua polara ekspedicio (1871 – 1872)

En la jaro 1871 Julius Payer partoprenis en sia la dua polara ekspedicio al Svalbardo. La ekspedicio havis du estrojn. **Carl Weyprecht** (1838 – 1881) gvidis maristan parton de la ekspedicio kaj **Julius Payer** (1841 – 1915) gvidis sledajn ekskursojn. La ekspedicio

sur la velŝipo Isbjörn (Blanka Urso) akiris la 78-an gradon de norda latitudo. Post reveno Payer estis honorita per Ordeno de Italia Krono (1872).

La tria polara ekspedicio (1872 – 1874)

En la jaroj 1872 – 1874 Payer kaj Weyprecht gvidis la plej grandan ekspedicion. Celo estis trovo de vojo el Norda Maro trans Maro Barents en Markolon Bering.

Ekspedicianoj uzis la imperiestran kaj reĝan ŝipon Admiral Tegetthoff, kiu havis kargokapablon 220 t, longon 44,81 m, larĝon 7,3 m kaj alton: 3,74 m.

La ŝipo havis tri mastojn por veloj, sed ankaŭ vapormaŝinon (100 ĉevalfortoj = 73 kW). Ŝipanaro (24 viroj) loĝis en du kajutoj. En la ŝipo la ekspedicianoj havis 130 t da karbo kaj provizojn, kiuj estis planitaj por tri jaroj.

Ŝipanoj estis:

Oficiroj:

Carl Weyprecht (1838 – 1881) el Michelstadt en Odenwald, Germanio, leŭtenanto de ordinara ŝipo (tio respondas al la rango kapitano de infanterio), komandanto;

Julius Payer el Teplice (1841 – 1915), Bohemio, leŭtenanto, komandanto;

Gustav Matouš Brosch (1844 – 1924) el Chomutov, Bohemio, leŭtenanto de ordinara ŝipo;

Eduard Orel (1841 – 1892) el Nový Jičín, Moravio, adjutanto de ordinara ŝipo (tio respondas al la rango superleŭtenanto de infanterio),.

La oficiroj stiris la ŝipon kaj faris sciencajn observojn. Brosch ankaŭ zorgis pri stokitaj nutraĵoj.

Kuracisto:

D-ro Julis Kepes el Vári, Hungario, kuracisto de regimento (= kapitano de infanterio);

Maŝinisto:

Ota František Kříž (1845 – la 16-an de marto 1874) el Pačlavice apud Kroměříž, Moravio;

Ŝipmajstro:

Petar Lusina el Cres, Kroatio;

Ĉarpentisto:

Antun Večerina el Draga apud Rijeka;

Maristoj: **Antun Zaninović** el Hvar, **Antun Katarinić** el Male Loŝinje, **Antonio Scarpa**

el Triesto, **Antun Lukinović** el Pušišć en insulo Brač, **Josip Latković** el Plomi en Istria,

Petar Falesić el Rijeka, **Djordje Stiglič** el Bakarac, **Vinko Palmić** el Lovran, **Lorenzo**

Marola el Rijeka, **Franjo Lettis** kaj **Jakov Sušić** el Volosko apud Opatija.

Kuiristo: **Johann Orasch** el Graz;

Hejtisto: **Josef Pospíšil** el Přerov;

Johann Haller el Schlanders en Vintschgau en Tirolo, alpinisto, ĉasisto, gvidanto de hundoj;

Alexius Klotz el Sankta Leonardo en Passeiera Valo en Tirolo, alpinisto, ĉasisto, gvidanto de hundoj;

Elling Carlsen el Tromsø, scianto de glacio, harpunisto.

La ekspedicio havis ok hundojn, el kiuj du devenis el Sameio kaj ok el Vieno.

En la kolektivo, kiu planis tri jarojn vojaĝi en Arktido, ne estis kutimaj sociaj barieroj inter oficiroj kaj aliaj ŝipanoj. Ili devis fidi unu la alian. Eraro de unu ekspediciano povis

endanĝerigi vivojn de ĉiuj. Ili estis kristanoj, tial ili partoprenadis en regulaj diservoj. Precipe kredo je Dio al li helpis transvivi en krudaj polaraj vivkondiĉoj, kie estis frosto kaj mallumo.

La ŝipo Admiralo Tegetthoff iris preter Sameio al Novtero kaj kontinuus preter ĝia norda marbordo. La 22-an de aŭgusto 1873 Admiralo Tegetthoff estis blokita en glacio kaj nur driftis al Francjozefaj Insuloj. La ekspedicio nordan vojon ne trovis, sed **malkovris la insularon Francjozefaj Insuloj (la 30-an de aŭgusto 1873).**

Tie vivis neniuj indiĝenoj. Super 192 insuloj kaj insuletoj flugas alkedoj kaj mevoj. En la maro troviĝas 33 fiŝaj specioj, kiuj ne havas grandan ekonomian signifon. Abundaj mambestoj estas vulpoj polaraj (*Alopex lagopus*) kaj ursoj blankaj (*Ursus maritimus*). La nomo Arktido devenas de greka nomo de urso (αρκτός). Ursoj estis agresemaj, tial la ekspedicianoj ofte devis sin defendi per siaj pafiloj.

En maro troviĝas rosmaro pacifika (*Odobenus rosmarus*) kaj du fokaj specioj: foko groenlanda (*Pagophilus groenlandicus*) kaj foko barba (*Erignathus barbatus*). El cetacoj tie troviĝas baleno akrapinta (*Balaenoptera acutorostrata*), baleno ĝiba (*Megaptera novaeangliae*), baleno blanka (*Delphinapterus leucas*), orcino granda (*Orcinus orca*) kaj narvalo unudenta (*Monodon monoceros*).

Ekspedicianoj ŝatis manĝi ursan viandon, sed viando de fokoj ne estis ŝatata. Problemo estis manko de vitamino C, kiu kaŭzis skorbuton.

La **16-an de marto 1874 forpasis maŝinisto Ota František Kříž** kaŭze de tuberkulozo kaj skorbuto. Li estis entombigita sub glacieron kaj ŝtonojn, por ke lian korpon ne trovu polaraj vulpoj kaj ursoj.

Payer kreis la unuan mapon de la insularo. La mapo enhavas la nomojn **Kabo Brno, Golfo Teplice kaj Insulo Ŝanov.**

La ekspedicianoj ne havis sufiĉe da provizoj por venonta vintro, tial ili forlasis la ŝipon kaj post 96 tagoj de vojaĝo kun tri boatoj ili ekvidis ruslandajn boatojn. Fiŝistoj el ruslanda skuno Nikolaj ilin savis. La 3-an de septembro 1874 la skuno Nikolaj jetis sian ankron en norvegia haveno Vardø. Post reveno (la 20-an de septembro 1874) Payer kaj Weyprecht estis honoritaj per Ordeno Leopold, sed kelkaj oficiroj dubis pri rezultoj de la ekspedicio. Ili diris, ke neniuj Francjozefaj Insuloj ekzistas. Tial malplezurigita Payer forlasis armeon, aranĝis prelegojn kaj verkis libron. Baldaŭ post eldono de la libro li en oktobro 1876 kavaliriĝis. Sub kavalira blazono li havis la sloganon „**Trans malfacilaĵoj al steloj!**“ („*Per aspera ad astra!*“).

Carl Weyprecht publikis sian ideon: „**Ni devas la poluson konkeri paŝo post la paŝo kaj per unuiĝintaj fortoj. Internacia konkurso pri akiro de la poluso estas sensenca. Aventuraj ekspedicioj malbone servas al scienco kaj bezonas egajn elspezojn, penon kaj multe da viktimoj.**“ Tiel Carl Weyprecht (1838 – 1881) fariĝis fondinto de internacia kunlaboro enkadre de konkerado de norda poluso.

Pentristo

Payer estis talentita pentristo, kiu studis pentradon en Frankfurto, Muniĥo kaj Parizo. Li pentris en stilo de franca realismo.

Julius Payer edziĝis, vivis en Frankfurto, Muniĥo kaj havis du infanojn, kiuj naskiĝis en Parizo. Sed lia persona vivo ne estis feliĉa. Lia edzino ŝatis lukson, tute alian vivstilon ol alpinisto kaj artisto Payer. En la jaro 1884 Payer estis operaciita. La operacio de hordeolo ne estis malfacila, sed kaŭze de infekto Payer perdis unu okulon. Tial li siajn pentraĵojn kreis unuokula en ateliero de hungara pentristo **Mihály Munkácsy** (1844 – 1900) en Parizo. En la jaro 1890 Julius Payer divorcis. Liaj infanoj Julius kaj Alice franciĝis, sed Payer kun ili ofte korespondis.

Por speciala pentrista ekspedicio al marbordoj de Groenlando Payer ne sukcesis kolekti sufiĉe da mono.

En la jaro 1890 li ricevis pension, 400 florinojn per unu jaro, sed li gajnis monon precipe kiel instruisto de pentrado.

En komenco de la 20-a jarcento Payer ofte vizitadis Svision. En la jaro 1912 li suferis de cerba atako kaj estis parte paralizita. Li mortis **la 29-an de aŭgusto 1815** apud svisia Lago Bled kaŭze de kora atako. La 4-an de septembro li estis entombigita en Vieno en honora tombo kiel heroo.

Epilogo

Inter Francjozefaj Insuloj situas Insulo Payer.

Kvin jaroj post ekspedicio de Weyprecht kaj Payer la Nordorienta Mara Vojo estis trovita. Svedo **Adolf Erik Nordenskjöld** [nordenŝeld] (1832 – 1901), kiu gvidis la ekspedicion Vega (1878-1879), la 18-an de julio 1879 transfosis Beringan Markolon el Ĉukĉa Maro en Pacifikon. La vojo estis uzata, sed ĝi ne estis ekonomie avantaĝa, ĉar ŝipoj bezonis helpon de glacirompŝipoj.

Ekde la jaro 1914 Franjozefaj Insuloj apartenas al Ruslando, poste al Sovetunio. Rusoj uzis tiun teritorion por astronomaj, meteorologaj kaj armeaj celoj. Post disfalo de Sovetunio (1991) soldatoj foriris. Ili tie lasis 250 000 barelojn da fuelo kaj unu milionon de malplenaj bareloj de likvida fuelo. Tial minacas ekologia katastrofo.

La plej bela bildo de Julius Payer „Neniam Reen“, kiun unuokula maljuna pentristo kreis en Vieno, temas pri lasta 96-taga marŝo de laciĝitaj kaj malsanaj ekspedicianoj el la ŝipo Admiralo Tegetthoff tra polara lando. Ĝi instruas nin, ke ni neniam devas rezigni grandajn ideojn kaj celojn.



Julius Payer: Neniam Reen.

Rekomendita literaturo

- DORAZIL, O. 1997: Světové dějiny v kostce, la 4-a eld., Vimperk, Papyrus / Rudná u Prahy, JEVA, 536 paĝoj.
- DÖRFLINGER, J., WEICHINGER, J., KINAUER, R. & HAMANN, G. 1973: 100 Jahre Franz Josefs-Land. Zur Erinnerung an die Entdeckungsreise der Österreichisch-Ungarischen Nordpol-Expedition 1872 – 1874 unter Julius von Payer und Carl Weyprecht. Ausstellung im Prunksaal der Österreichischen Nationalbibliothek. Katalog. 1-a eld., Vieno, Österreichische Nationalbibliothek, 128 paĝoj.
- HORA-HOŘEJŠ, P. 1998: Toulky českou minulostí, la 7-a volumo, la 1-a eld., Prago, Via Facti, 222 paĝoj.
- HORA-HOŘEJŠ, P. 2000: Toulky českou minulostí, la 8-a volumo, la 1-a eld., Prago, Via Facti, 222 paĝoj.
- HORA-HOŘEJŠ, P. 2002: Toulky českou minulostí, la 9-a volumo, la 1-a eld., Prago, Via Facti, 223 paĝoj.
- ЛОМОНОСОВ, М. В. 1763: Краткое описание разных путешествий по северным морям и показание возможного проходу Сибирским океаном в восточную Индию.
<https://www.sevprostor.ru/poleznoe-interesnoe/sever/759-geograficheskie-predskazaniya>
- ORTOVÁ, J. 1976: Julius Payer. Z Čech až k severnímu pólu. 1-a eld., Jablonec nad Nisou, Severočeské nakladatelství, 80 paĝoj.
- PAYER, J. 1876: Die österreichisch-ungarische Nordpol-Expedition in den Jahren 1872 – 1874, nebst einer Skizze der zweiten deutschen Nordpol-Expedition 1869 – 1870 und der Polar-Expedition von 1871, 1-a eld., Vieno, Alfred Hölder, 847 paĝoj.
- PAYER, J. 2019: Expedice na severní pól. 1-a eld., Prago, Dauphin, 421 paĝoj.
- TRÁVNÍČEK, D. 1993: Julius Payer (1841 – 1915). Sborník k 150. výročí narození. 1-a eld., Teplice, Regionální muzeum v Teplicích, 21 paĝoj.
- URBANOVÁ, J. 2004: Brněnští mariňáci. Poslední veteráni rakouského válečného loďstva. 1-a eld., Brno, Barrister & Principal, 155 paĝoj.
- Bildkarto el la ekspozicio SUB IMPERIESTRĀ AGLO, Moravia Landa Muzeo en Brno 1991 – 1992.
- Malkovro de Francjozefaj Insuloj en la jaro 1873** / Pafcelo el jaro 1875 el kolekto de Patrujsciencia Muzeo en Olomouc. Eldonis: Vydavatelství a nakladatelství, Brno, Ĉeĥoslovakio, 1991.